

Flandra ESPERANTISTO

TIJDSCHRIFT VOOR ESPERANTO - ONDERWIJS EN -PROPAGANDA

Orgaan van de VLAAMSE ESPERANTISTENBOND, St. Klaradreef 59, BRUGGE

Postrekening 2321.50 van V. E. B. Raapstr. 74, Gent

Verschiĝnt maandelĝjs
Twee en twintigste jaarg.
Nummer 11/12 (254/255)
NOV.-DEC. 1955

LIDMAATSCHAPSGELDEN:
Leden: 100 F (met inbegrip van het bondsorgaan)
Steunleden: 150 F (idem)
Inwonende leden: 25 F (met inbegrip van „De Esperantist”)
Jongeren (onder de 21 jaar): 50 F

ABONNEMENTEN:
België: 75 fr.
Ceteraj landoj: 75 bfr.
Proefn.: 5 fr. (1 r.k.)

Esperanto antaŭ la Eŭropa Konsilantaro

Komence de la aŭtuna sesio de la Eŭropa Konsulta Asembleo niaj s-anoj D-ro Herrmann, (Germanujo), L. Laurat, kaj P. Petit (ambaŭ el Francujo) estis en Strasburgo kaj sukcesis akiri la subskribojn de 14 delegitoj el Anglujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Norvegujo sub propono de nova rekomendo pri la lingvo-problemo.

Por ke la Eŭropa Konsilantaro povu ekzameni, ĉu Esperanto eble donos elvojon el la lingvaj malfacilaĵoj, oni proponas, kiel eksperimenton, la oficialan instruadon de Esperanto en po unu klaso kun lernantoj de 11 ĝis 14 jaraj en Britujo, Francujo, Germanujo, Italujo kaj Nederlando. Post unu jaro de studado, la lernantoj estu ekzamenataj en Strasburgo.

La 25an de oktobro konsiderinte la aferon, la Konsulta Asembleo decidis sendi la proponon al la kompetenta Komitato por Kulturaj kaj Sciencaj Demandoj por prepara pritraktado.

La Konsulta Asembleo verŝajne jam dum la maja sesio 1956 definitive decidis pri la rekomendo.

Ni esperas, ke estos eble dum tiu sesio montri ankaŭ la faman Esperanto-Ekspozicion de Montevideo en Strasburgo.

Pri la plua evoluo de tiu tre grava afero la esperantista publiko ĝustatempe ricevos la necesajn informojn. Ni urĝe petas niajn gesamideanojn, ke ili ne ĝenu iun ajn oficialajn instancojn aŭ personojn sen komisiono de la estraro de nia Ligo.

* *

Jen la teksto de la suprealudita rekomendo:

La Konsulta Asembleo, konsiderante

1e) ke la lingvaj malfacilaĵoj malfelpas al pli bona interkompreniĝo inter la Eŭropaj popoloj, kaj samtempe al la disvastigo de Eŭropa solidareco;

2e) ke la internacia lingvo Esperanto,

pro sia facileco kaj sia neŭtrala politika neŭtraleco, estus eble akceptebla solvo por malpligrandigi en Eŭropo la malfacilaĵojn de la lingvoj;

Rekomendas al la Komitato de la Ministroj la eksperimentan organizaĵon, en klaso de volontuloj, de oficiala instruado de la internacia lingvo Esperanto (lernantoj dekunu-ĝis dekkvarjaraj) en unu lernejo de ĉiu el la sekvantaj membro-ŝtatoj: Germanujo, Francujo, Britujo, Italujo, Nederlando (N.d.l.R.; Oni elektis kvin landojn kun kvin diversaj lingvoj).

Post unu jaro da studado, la lernantoj estos kunigitaj en Strasbourg. La kultura Komisiono de la Eŭropa Konsilantaro prezentos al la Konsulta Asembleo raporton pri la akiritaj rezultoj.

Subskribis:

- Britujo: S-oj JONES, POPPLEWELL, THOMSON.
- Francujo: S-oj Yvon DELBOS, BICHET, de FELICE, PINTON.
- Germanujo: S-roj ERLER, LUTKENS, S-inoj REHLING, WEBER.
- Italujo: D-ro EBNER, S-ro BOGGIANO PICO.
- Norvegujo: S-ro STROM.

Kiel oni vidas la nomo(j) de nederlanda(j) delegito(j) mankas. Kial???

* *

Post la kunsido de la Eŭropa Konsilantaro S-ro Petit ricevis de S-ro Guy Mollet la jenan leteron, kies enhavo parolas por si mem.

Konsulta Eŭropa Asembleo
La Prezidanto

Strasbourg 26 de oktobro 1955

Kara Sinjoro,

Via letero de la 19 de oktobro estas en miaj manoj. Kiel ni interkonsentis en Strasbourg, mi komunikis vian peton al S-ro la Ĝenerala Sekretario de la Eŭropa Konsilantaro por ke es-

Jarfina Vorto

En nia antaŭa numero, ni jam parolis pri kelkaj malfacilaĵoj, kiuj okazigis prokraston en la aperigo de la diversaj kunligataj revuoj.

Ni aroncis ke numero de novembro aperos post mallonga tempo.

La Prezidantoj de la kunigitaj Ligoj tamen decidis preferi eldoni, nun tuj, unu numeron por NOVEMBRO kaj DECEMBRO, tiel ke la numero de januaro kaj de la sekvontaj monatoj povos aperi je la kutima dato: tio estas en la tutunaj tagoj de la monato, kies nomo estas indikata sur la revuo.

Ni fidas ke niaj membroj kaj legantoj komprenos kaj aprobos tiun ĉi decidon.

Ni antaŭdankas kaj prezentas al ĉiuj, jam nun, niajn plej korajn dezirojn okaze de la venontaj festoj.

tu rajtigita la instalo, en Strasbourg, en la salonoj de la Konsilantaro, de la Esperantista ekspozicio dum majo 1956. Mi sciigis samtempe al S-ro Léon Marchal mian deziron, ke tiu peto havu favoran akcepton.

Pri la rezolucia projekto deponita ĉe la oficejo de la Asembleo de 14 esperantistaj reprezentantoj, mi havas la plezuron informi vin, ke, post propono de ĝia estraro, la Asembleo favore konsideris ĝin dum sia kunsido de la 25 de Oktobro kaj ĝin resendas al sia Komisiono por la Kulturaj kaj Sciencaj temoj. Mi esperas grande ke tiu ĉi ĝin akceptos kun simpatio.

Mi skribas samtempe al S-ro Herrmann, kiu akompanis vin en Strasbourg por informi lin pri tiuj unuaj rezultatoj.

Bonvolu akcepti, Kara Sinjoro, la esprimon de miaj plej bonaj sentoj

Guy Mollet.

Al S-ro Petit, Union Esperantiste française, 34 rue de Chabrol Paris. 10^eme.

41-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

KOPENHAGO - (DANLANDO)

4 aŭgusto - 11 aŭgusto 1956

N-ro 1 OFICIALA KOMUNIKO Novembro 1955

ADRESO: Por korespondadoj sufiĉas: 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.**BANKO:** La kongresa banko estas: Handelsbanken, Kopenhago, Danlando.**POSTGIRKONTO:** 41-a Universala Kongreso de Esperanto, n-ro 97820, Kopenhago, Danlando.**PAGOJ:** Oni povas pagi al la oficialaj perantoj, sed necesas sendi al ili samtempe la aliĝilon.**ALIGILOJ:** Petu ilin ĉe la perantoj, ĉe la landaj asocioj aŭ ĉe 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando.**GLUMARKO:** Oni povas aĉeti la kongresan glumarkon ĉe la perantoj, ĉe via landa libro-servo aŭ ĉe 41-a Universala Kongreso de Esperanto, Kopenhago, Danlando. Prezo: po 50 oaroj aŭ 1 Internacia respondkupono por ĉiu folio de 25 markoj. La esperantistoj estas petataj uzi amase ĉi tiun propagandilon.**ALIGLIMIGO:** Pro diversaj teknikaj kaŭzoj ne povas esti akceptataj pli ol 2200 aliĝiloj.**INFANA KONGRESETO:** L.K.K. decidis organizi en la kadro de la 41-a U.K. la 1-an Internacian Infankongreseton por esperanto-parolantaj infanoj ĝis 13 jaroj. La aranĝoj okazos en la infangardeno „La ludoĉambro”, kie Esperanto estas instrua fako. En la kongresejo okazos ekspozicio de infanaj manartaĵoj. Detaloj sekvos en venontaj komunikoj.**ARTIKOLOJ:** Klubo, aliĝintaj al landa asocio, povas ricevi artikolon pri la kongresurbo kaj lando por kluba programo. Mendu pere de via landa asocio.**POSTKONGRESO:** L.K.K. elektis kiel oficialan postkongresan urbon: MALMÖ, Svedujo. Detaloj sekvos.**STATISTIKO:** (ĝis fino de oktobro) Anglujo 17, Aŭstrujo 2, Belgujo 2, Brazilo 3, Danlando 34, Finnlando 6, Francujo 28, Germanujo 17, Hispanujo 4, Italujo 37, Jugoslavujo 27, Nederlando 11, Norvegujo 9, Novzelando 1, Svedujo 25, Svisujo 7, Usono 2, sumo 232 el 17 landoj. (pasintjara 170 el 20 landoj.)Gian Carlo Fighiera
Konstanta Kongresa Sekretario.

ris 3 semajnojn.

Komprenble ankaŭ tie oni spertis lingvajn malfacilaĵojn kaj la raportisto de Deventer Dagblad skribis en sia artikolo de la 16a de sept. pri ĉi tiu konferenco, ke ili estas bonege solvitaj per la dungo de 9 interpretistoj (3 por la franca, 3 por la angla kaj 3 por la hispana lingvoj), la luado de teknika instalaĵo kun mikrofonoj, kapaŭdiloj k. t. p. La interpretistoj ricevas po 175 guldenoj ĉiutage kaj la luprezo por la instalaĵo estas 8 mil guldenoj. La tuta sumo de la kostoj por venki la lingvajn malfacilaĵojn estas 80 mil guldenoj inkluzive de la luprezo.

Ŝajnas al ni, ke tiu bonega solvo estas ne iom multekosta sed ankaŭ ne tre celtrafa ĉar kiam la ĉeestantoj demetas sian kapaŭdilon ill tuj perdas la kontakton kun la parolanto. Krome kiam oni forlasis la kunvenejon la ĉeestantoj povas havi nur malmultan spiritan kontakton unu kun la alia ĉar oni ja havas ne ĉiam interpretiston post si. Laŭ nia opinio ekzistas nur unu bonega solvo, t.e. kiam ĉiuj ĉeestantoj en tiaj kongresoj aŭ konferencoj povas paroli unu saman lingvon, la internacian lingvon Esperanto.

F.W.

Tra la Mondo

U.N.E.S.C.O.-Novajoj

Internacia Ekspozicio de poŝtmarkoj en Prago.

Ĉirkaŭ tridek ŝtatoj partoprenis en la ekspozicio de poŝtmarkoj, kiu okazis en Prago (Ĉ.S.R.) de la 10-25 de Septembro. La kolekto inkluzivis unu liveritan de la plej nova poŝta administracio en la mondo, nome tiu de UNUIGINTAJ NACIOJ. Okaze de la ekspozicio, la ĉeĥoslovaka poŝta administracio eldonis serion de 5 poŝtmarkoj kun diversaj valoroj. La poŝtmarkoj prezentas ekzemplojn de pluraj arkitektaĵoj stiloj.

Laŭ Unesco Features kaj U.E.A. Informservo).

De Montevideo al Kopenhago...

Prof. Blinkenberg, dana delegito ĉe UNESCO, atakis esperanton, sed... la dana Ministerio por Eksteraj Aferoj tamen eldonis je propraj kostoj la artikolon pri la 150-jara naskiĝtago de la fama verkisto H. C. Andersen, kaj tiel grave helpis ankaŭ al nia movado!

Internacia Junularkunveno en Germanujo en 1956a

Kiel ĉiujare, ankaŭ en 1956a tutmonda Esperanto-Junular-Organizo efektivigos Internacian Junular-Kunvenon (la 12an), kiu sekvos tiun mirinde sukcesintan en L'Aquila (Italujo) ĵus pasintan aŭguston. La elektita urbo estas la bone konata germana banloko Busum, sur la bordo de la Norda Maro, proksimume 120 km. norde de Hamburgo. La kunveno okazos de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto por ebligi al la partoprenantoj la ĉeeston ankaŭ en la Universala Kongreso. Rapidaj internaciaj vagonaroj povos tute komforte atingi Kopenhagon en mallonga tempo. Detaloj sekvos.

Skisemajnoj por Gejunuloj

La Tutmonda Esperanto-Junular-Organizo aranĝas ĉiutage du skisemajnojn en la plej bela skiregiono de la aŭstria liglando Salzburg.

La unua semajno okazos de la 26a de decembro 1955a ĝis la 1a de januaro 1956a sur *Felseralm*, kaj la dua de la 7a ĝis la 14a de januaro 1956a sur la *Gottschallam*, ambaŭ situantaj sur *Radstädter Tauern* proksime al urbo *Radstadt* en la lando Salzburg. La prezo, 250.— aŭstr. ŝil., inkluzivas tranoktadon, trifojan manĝadon ĉiutage kaj transporton de la finstacio de la aŭtobuso al la skikabano. La pejzaĝo estas mirinde bela, la kabanaj staras meze de sovaĝa rokaro.

Poezio

LA MISTERA KREO

En la alto de l'ĉielo
la Sinjor'
babiladis kun anĝelo
kun videbla bonhumor'.

Sed subite lin sufokis
ekkoler',
ĉar li la rigardon lokis
senintence al la ter'.

Tie homoj ja kondutas
sen raci',
nur militas aŭ disputas
laŭ plej stulta tradici'.

La Sinjoro diris lace:
„Stranga ter',
nekapabla vivi pace.
Ĉiam lukto kaj sufer'...

Kaj pro nuraj bagateloj!
Kia sport'
tiel por malgravaj celoj
sendi fraton al la mort'!

Ĉu vi povas do kompreni
ke malam'
en la homojn povas veni
nur pro mono aŭ bonfam'?

Ĉu vi kredus ke por gloro
iu hom'
kaŭzas spasmojn de doloro
en la homofrata dom'?

Aŭ pro iu monafero
kalumni'
sin enĉelas por sufero
de la tuta fami!'!

Kaj rimarku, tiu peko
por la riĉ',
post akiro de la ĉeko
eĉ ne gvidas al feliĉ'.

Kaj ĉemetis la Sinjoro
kun amar':
„El la tuta kre-laboro,
tero estas la misfar'.

Ĉu ĝi do eterne estos
nura ve'?

Je Mi! Ĝi bedaŭre restos
la mis-tero de la kre'.

Claude Piron

Dum frosta nokto

Mirinde, vintro sorĉas florojn
Milspecajn, densajn, senkoloroj
Sur la fenestroj de la dom'.
La prujno kovras nudajn branĉojn
Ĝemantajn pro la ventaj tranĉoj
Despota mano de l'sezono.

Ho, sorĉe brilas neĝkristalo.
Saluto el ĉielportalo.
Ĉu eble eĉ anĝela larm'?

Ho, kiso por la virga tero
La pura, blanka, neĝa ero
En vero, estas pec' de ĉarm'

Ortrilaj steloj sur ĉielo
Radias en la termalhelio
Pendantaj sur la noktlazur'
Juveloj de la firmamento,
Vi, lumoj sur ĉieltegmento
Mirakla via lumvelur'.

A. A. Leenhard.

Ĉiu aliĝinto ricevos specialan cirkuleron. Anoncu vin plejble baldaŭ menciante naskiĝdaton, sekson kaj profesion, S-ano REITER Heinrich, SALZBURG, I, 557, Aŭstrujo.

T.W.A. uzas Esperanton:

La komerca direktoro de TWA en Svislando, S-ro H.G.A. Meili, sendis al multaj Esperantistoj cirkuleron en Esperanta lingvo. T.W.A. (= Trans World Airlines, Trans-Monda Aerlinio) estas la plej grava aervetura kompanio de Usono. Ĉiutage 52 kvarmotoraj „T W A-Constellations” transflugas la nordamerikan kontinenton, kaj ĉiusemajne la maŝinoj de la TWA flugas 96-foje trans la Atlantikon.

Brazilia koresponda Centro por tuta Mondo

Sendu jare 100 uzitajn poŝtmarkojn de via lando kaj vi estos membro ĉe Brazilia Koresponda Centro por tuta Mondo, kiu sendas jare al siaj membroj en ĉiuj kontinentoj, nomojn kun adresoj de geesperantistoj de diversaj aĝoj. Estas oportune legeble citi: nomon, adreson, naskiĝtagon, sekson, profesion kaj kiujn lingvojn vi konas krom Esperanton.

Poŝtkesto 1612
Curitiba — Brazilio

ANONCO

Por konverti miajn profesorojn kaj kolegojn mi faros paroladon kaj aranĝos ekspozicion pri Esperanto en nia Kolegio.

Bonvolu sendi taŭgan materialon tiucelan al MARKO STUIT, St Croix de Neiges, Haute Savoie, Francujo.

NED. ESPERANTISTEN-VEREN. „LA ESTONTO ESTAS NIA”

Alg. Secretariaat, schr. cursus voor beginners en uitleendienst:
Mej. A. C. H. van den Beek, P. C. Hooftstr. 90, Amsterdam-Z.
Penningm.: B. J. J. Albers, Olympiaweg 69 III, Amsterdam-Z. Postrek. 34563.
Adm. Ned. Esp.: P. M. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O.
Boekendienst: S. Mabesoone, Pythagorasstr. 122, Amsterdam-O. Postrek. 76915.
Schr. cursus voor gevorderden: H. Appel, Z.O.-singel 5, Bergen op Zoom.
Bibliotheek: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht.
Propaganda-dienst: H. Bakker, Van Tuyllplein 33/1, Amsterdam-Zuid, tel. 95320.
Alg. Ned. Esp. Examen-comm.: Mej. H. M. Mulder, Zilvermewstr. 29 Badhoevedorp
Cefdel. U.E.A.: J. Telling, Schietbaanlaan 106, Rotterdam. Postrek. 242619.
Vic-ĉefd. F. Weeke, Zwolseweg 172 A, Diepenveen. Postrek. 822075.

Atentu

Ekde la proksima numero, S-ro F. Weeke reprenos la redaktadon de la revuo.

Oni do, ĝustatempe kaj prefere antaŭ la 10a de ĉiu monato, sendu la presotajn al lia adreso: Zwolseweg 172 A, Diepenveen.

Komunikoj de la ĉefestraro

Ni atentigas la sekciojn pri tio, ke proponojn pritraktotajn en la ĵarkunveno, oni sendu antaŭ la 15a de januaro 1956 al la ĝenerala sekretario, P. C. Hooftstr. 90, Amsterdam.

Al tiu sama adreso oni sendu ankaŭ la novajn donacant-kaj membrolistojn klare indikante la estraranojn, samhejmanojn kaj gejunulojn. De ĉiu listo oni devas sendi tri ekzemplerojn.

Kontakto. Por plivigli la kontakton inter la ĉefestraro kaj la sekcioj, ni dividis la landon en kelkaj partoj. Pri ĉiu parto unu el la ĉefestraranoj respondecas. Li/ŝi havos duoblan taskon: Unue ekscii bonajn ideojn por propagando, organizo kaj aranĝo de la klubvesperoj, kiujn oni kun sukceso aplikis en sekcioj. Due doni konsilojn kaj havigi moralan kaj se necese financon helpon por la progresigo de nia movado.

Baldaŭ la sekcioj ricevos apartan cirkuleron pri ĉi tiu temo.

VARBILOJ. Ni preparas la reeldonon de la broŝureto „Esperanto, De Internationale Taal”, origine disdonita de la National Education Association en Washington. Ĝi estas revizita laŭ la nunaj cirkonstancoj kaj aperos en pli alloga kovrilo je iom pli granda formato.

La Arnhema Kunlaborkomitato eldonis stencilitan broŝuron kompilitan de D-ro H. Groendijk, kiu meritas vastan uzon. Ni serĉas rimedon aperigi tiun broŝuron presita, prefere en la kadro de N.C.K.E.

Kantato de Frieso Molenaar. La sukcesplena dumkongresa prezento de la Kantato Zamenhof estas fiksita sur sonorubando. Ĉar pruntedono de la ori-

ginalo estus iom riska, la ĉefestraro decidis fariĝi kopion. Tial, ni baldaŭ povos doni la okazon al niaj sekcioj aranĝi vesperon dum kiu ĉiuj membroj kaj aliaj muzikamantoj povos havi agrablan kaj instruon horon. Por tio oni devas disponi pri magnetofono kaj pagi malgrandan sumon al Buma por aŭtoraj rajtoj kaj krome la kostojn por la forsendo.

Esperanto en la lernejo

La Oficejo „Esperanto ĉe la Instruado” ankaŭ ĉi tiun jaron enketas pri la Esperanto-instruado al infanoj en la lernejoj en Nederlando. Tial ni sendis demandaron al tiuj adreso, pri kiuj ni scias aŭ supozas, ke Esperanto estas instruata. Por ke la enketo estu kiel eble plej kompleta kio precipe en ĉi tiu jaro estas grava rilate al la propono ĉe la Europa Konsilantaro pri provo de Esperanto-instruado en diversaj landoj, ni petas helpon al la legantoj. Se vi scias, ke en iu lernejo en via regiono oni instruas Esperanton, ĉu en, ĉu ekster la ordinara instruado, skribu al ni la adreson, por ke ni ankaŭ pri tiu instruado povu akiri la necesajn informojn.

En la nomo de la Oficejo „Esperanto ĉe la Instruado”, Ceintuurbaan 227, Deventer.

C. B. Zondervan,
direktoro.

PLAATSELIJK NIEUWS

Alkmaar. In Alkmaar wordt thans op drie openbare scholen aan ongeveer 70 kinderen Esperanto onderwezen vanaf 1 September. Bovendien volgen 6 leerlingen een vervolgcursus, terwijl tevens 3 onderwijzers een cursus volgen.

Festvespero en Bussum

La sekcio de Bussum invitas ĉiujn geamikojn ĉeesti festvesperon, kiu okazos la 14an de januaro en hotelo Vlietlaan; tuj apud la stacidomo.

La eniro estas senpaga kaj la programo enhavos plej variajn numerojn.

LA STUDANTO

Jen la „konciza” formo de

Ekzerco 27 A:

1: Matene ni konsumas la matenmanĝon. 2: Poste multaj personoj iras bicikle, trame aŭ aŭtomobile al sia laboro. 3: La dommastrinoj kutime restas hejme. 4: Ili zorge preparas la tagmanĝon kaj la vespermanĝon. 5: Ili purigas la domon per polvuŝilo. 6: La edzoj kaj la infanoj revenas hejmen (la direkta akuzativo anstataŭas ĉi tie la prepozicion „al”) tagmeze kaj vespere. 7: Ili manĝas apete. 8: Bongustaĵo ĉiam estas bona al sanulo. 9: Malfruvespere la plej multaj homoj enlitiĝas. 10: Ankaŭ multaj homoj fervore laboras aŭ deoras nokte.

Jen ekzemplo de plenumo de

Ekzerco 26 B:

1: En la fiŝvendejo kuŝis dika, glata angilo volvita ĉirkaŭ sia vosto kiel serpento. 2: En angulo de la butikio estis granda staplo da skatoloj kun konservitaĵoj: fiŝaĵoj kaj fruktoj en sia suko. 3: Balbutema sinjoro iris en la butikon kaj diris: „Mi ŝatus acet.ĉet.ĉeti ananason.” 4: La butikisto, supozante, ke la kliento balbutis ankaŭ la lastan vorton, kaj ne volante plinervigi lin per ripetigo, iris tra la malantaŭa pordo kaj revenis post kelkaj minutoj kun..... buĉita anaso. 5: Li anhelis pro la rapida reveno el la kelo. 6: Volante anticipi laŭdon per balutoj de la kliento, li diris: „Tio estas bona, graso anaso! Ĉu enpaki?” 7: Anstataŭ la atenditan: „Jes!” la kliento diris: „Ne, ne, mi estas vegeta...rano. Mi dezir...zir apliki mian pri...pri...principon. Bonvolu doni ana...na...nason al mi!” 8: La butikisto devis tiom ridi, ke li devis apogi sin sur la butikio tablo. 9: Post la rido li prenis skatolon da ananaso kaj la kliento aprobis enpaki ĝin. 10: La acetio estis tiel tamen aranĝita laŭ la deziro de la kliento.

NOVAJ EKZERCOJ:

Ekzerco 28 A:

Kompletigu la vortojn per la ĝustaj literoj:

1: Esperant— estas la Lingv— Internaci— kreit— de doktor— L. L. Zamenhof. 2: Esperant— flu— parolas tre mult— person—. 3: En mult— internaci— kongres— Esperant— jam montriĝis tre util—. 4: Ki— kuraĝ—, optimism— kaj entuziasm— havis dr— Z., kreant— kaj propagandant— nov— komun— lingv—. 5: Sen—dub— li aŭdis mult— protest—, malre-

(Sekvo sur paĝo 8)

Alvoko al repago de kotizoj

La Kasistino petas ke la ĝemembroj repagu kiel eble plej baldaŭ la kotizojn por 1956.

Tio multege faciligas ŝian laboron.

Ankaŭ kongreskotizoj povas esti sendataj al ŝi.

ESTRARKUNVENO de la 2.10.1955

Je la antaŭmenciita dato la estraro sub prezido de S-ro Debrouwere G., kunvenis en Gent. Krom la financa situacio, ni preparolis diversajn gravajn punktojn precipe pri la nova statuto de UEA, kaj la agado de la landa asocio ĉe la nacia komitato de la U- NESKO.

S-ro D-ro Van Gindertaelen eksciĝis kiel komitatano de UEA.

Sekve de tio, nova komitatano devis esti elektata, konforme al la art. 25, A, de la statuto de UEA. Ĉar neniu efektive volis anstataŭi S-ron Van Gindertaelen, finfine nia sekretario sin proponas por provizore tiun taskon, kaj la estraro akceptis lin per 5 voĉoj kontraŭ du, kaj unu sindeteno.

La estraro, je propono de S-ro Maertens, akceptis S-ro Goossens el Lokeren kiel prizorganto de la gazetarservo. La sekretario interrilatos pri tio kun RBLE, ĉar unu servo en la Flandra parto de la lando jam ŝufiĉas.

S-ro Sutterman, ĝis nun prizorganto de nia korespondanta kurso, sciigis ke pro manko de tempo, li ne plu povas plenumi tiun servon, kaj ni do serĉos novan administranton por povi ankorau pli efektive daŭrigi tiun varbmanieron.

Dum la sama estrarkunveno, S-ano Iserentant nomiĝis kiel anstataŭanto de la protokola sekretario, kiu ĝis nun estis S-ano Monnaers, kiu tamen ne plu ĉeestas niajn estrarkunvenojn.

KOTIZOJ POR 1956

Jam ni devas denove paroli pri nova jaro; la estraro decidis ne ŝanĝi la kotizojn.

La ĜENERALA JARKUNVENO

La 4an de decembro, la prezidanto S-ro Debrouwere bonvenigis delegitojn de la sekcioj Antwerpen, Blankenberge, Brugge, Brussel, Gent, Leuven kaj Mechelen kaj reprezentantojn el Astene, Kortrijk kaj Roeselaere, kiuj vojaĝis al Gento.

Mallonge sed trafe li dankis kaj honorigis la veteranojn, kaj speciale tiujn, kiuj ne jam ricevis la diplomon okaze de la jubilea jaro, nome F-ino Decock, S-ino Van Tuyckom, kaj S-roj De Boes, Cortvriendt, Mortelmans kaj Van de Poel.

La raporto de la sekretario estis kun granda intereso aŭskultata. El ĝi evidentiĝis ke la membronombro stagnis en tiu jubilea jaro kaj ke ne estis aparta speciala agado de la sekcioj.

Flandra Ligo Esperantista.

Postbus 100, Mechelen

Prezidanto: Gerard Debrouwere, Magdalenestraat 29, Kortrijk.
Sekretario: Maertens G., Pr. Leopoldstr. 51, St.-Kruis, tel. 33445 (dum la ofichoroj).
Kasistino: F-ino J. Terrijn, Raapstraat 74, Gent.
Biblioteko: E. A. Koot, Joh. de Meesterstraat 12, Utrecht (Nederland)
U.E.A. peranto: Dr. F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge P.C. 4161.35.
Redakcio F.E.: Drs. Fern. Roose, Ste. Klaradreef 59, Brugge.
Korespondanta kurso: A. Nysstraat 37, Anderlecht

U.E.A.-,kaĉo”

La artikolo sub tiu titolo en la oktobra numero de „Flandra Esperantisto” aperis je la nura respondecado de la ĉefredaktoro S-ro D-ro Van Gindertaelen.

Sed poste la ĉeestantoj raportis pri interesaj klopodoj. Sekcio Gent ekz. publikigis artikolojn en la revuo de la Katolikaj instruistoj „DOCEO” kaj en tiu de la Genta liceo. Leuven okazigis paroladon kaj kurson. K.t.p. S-ro Van der Linden el Astene antaŭmetis interesajn proponojn rilate al prilaborado de la gepatroj de ĝelernantoj.

Pri niaj rilatoj kun U.E.A., S-ro Couwenberg antaŭmetis raporton. Estas iom malpli da membro-subtenantoj. Nia komitatano S-ro D-ro Van Gindertaelen ne povas konsenti je la statutŝanĝoj kaj tial eksciĝis. Nia sekretario S-ro Maertens provizore anstataŭos lin. La prezidanto sciigis ke ankaŭ R.B.L.E. renormaligos siajn rilatojn kun U.E.A. Pri la vendo de la domo en Heronsgate kaj la metado de la kapitalo en iu Angla konstrusocieto, kelkaj kompetentaj esperantistoj elmetas la ideon ke tio lasta ne estas aprobinda se ne estas iu internacia kaj tre forta entrepreno. Pi tio oni skribos al S-ro Mabesoone, la kasisto de U.E.A.

Korespondanta Kurso: S-ro Van de Velde de sekcio Gent prizorgos ĝin, ĉar S-ro Sutterman ne plu kapablas fari tion.

Redakcio: La redaktoro por „Flandra Esperantisto” ek de nun estas Drs. Fernand Roose, Ste. Klaradreef 59, BRUGGE.

Reelektado de estraranoj: F-ino Terrijn, S-roj Debrouwere, Monnaers,

Roose kaj Volders estas reelektataj. Sekcio Mechelen devos proponi kandidaton. Je la fino oni memorigis la tre grandajn meritojn de S-ro Dr. Van Gindertaelen kaj dankdediĉo estis subskribita.

Kondolencojn

Kondolencojn ni prezentas al nia Prezidanto kaj al S-ino Debrouwere okaze de ia morto de ilia bopatrino kaj patrino, kiu subite mortis, la 4an de decembro.

Al S-ro kaj S-ino Th. Van Gindertaelen pro la morto de ilia bopatrino kaj fratino, post perdo, — apenaŭ kelkajn tagojn antaŭe, — de onklino kara.

Al la familianoj de S-ro Albert Cognie, el Kortrijk, kiu estis, tiun ĉi jaron, honorigita kiel pioniro de la Flandra Esperanto-movado.

Nia unua ĉefredaktoro mortis

Jan van Schoor - simpla melodio
Ludata sur violonĉel.
Korflamoj junaj, rev-miel,
Eĉ velke ĉarma iluzio.

Sencela dolĉa nostalgio,
Sopir' je grava bagatel,
Jan van Schoor - simpla melodio
Ludata sur violonĉel.

Kaj al ĉi milda idilio
De printemp-pluva akvarel'
Miksiĝas fortkolora bel'
De l'Pol-de-Monta poezio.

Jan van Schoor - simpla melodio

K. Kalocsay
(el „Rimportretoj”)

La 18-an de oktobro 1955 mortis en Mortsel, apud Antwerpen, Jan van Schoor, estinta Lingva Komitatano, fondinto kaj unua ĉefredaktoro de „Flandra Esperantisto”.

Kiel meteoro li aperis ĉe la Esperanto-ĉielo, por malaperi subite, en la jaro 1933-a. De li aperis en Esperanto-traduko verkoj de A. de Musset, L. Baekelmans kaj la ĉefverko de F. Timmermans: „Pallietter”. Originale li verkis versokolekton „Amo kaj Poezio”. Li estis unu el la ĉefaj kunlaborantoj al la flandra parto de „Belga Antologio” kaj sennombraj estas liaj artikoloj, tradukoj kaj versaĵoj disemitaĵ tra la Esperanto-gazetoj.

KION NI POVAS LERNI EL 50-JARA USONA SPERTO?

de William Solzbacher

La 23-an de Marto 1955 la Esperanto-Asocio de Nord-Ameriko estis 50-jara. La komenco de la dua duonjarcento de ĝia historio estas taŭga okazo por pripensi la spertojn de la unuaj 50 jaroj kaj por trovi utilajn konkludojn por nia estonta agado. Membroj, kiuj ĉeestis la Jubilean Kongreson de EANA en Milwaukee, sendube interŝanĝos valorajn ideojn pri tiu temo kaj atingos decidojn, kiuj tradukos la spertojn de la unua duonjarcento en praktikan programon por la dua.

Estas banala konstato, ke la situacio en la mondo multe ŝanĝiĝis inter 1905 kaj 1955 kaj ke, kvankam la celo de la Esperanto-movado restis la sama, la praktikaj taskoj de nia propagando estas aliaj. Esperanto faris rimarkindajn progresojn. Tiuj progredoj plifaciligas la varblaboron. Vidante tiun fakton, ni tamen ankaŭ devas rigardi la alian flankon de la medalo. Kelkaj el la avantaĝoj, kiujn ni gajnis, estas akompanataj de malavantaĝoj.

Mi provos tion klarigi per du ekzemploj. La unua koncernas la propagandon en la gazetaro kaj la radio. Antaŭ kvindek jaroj, kiam Esperanto estis ankoraŭ preskaŭ nekonata en Nord-Ameriko, gazetoj kaj gravaj revuoj ofte publikigis informojn kaj artikolojn pri Esperanto. Fakte artikoloj pri Esperanto en gravaj revuoj en Usono estis multe pli multnombraj en 1905. 1906 kaj 1907, ol ili estas nun. Kial? Ĉar Esperanto estis io nova. Nuntempe ni ofte miras — kun malmulte da plezuro —, ke la ĵurnaloj mencias kaj priskribas neseriozajn aŭ eĉ tute fantaziajn lingvoprejektojn, kiu laŭ nia opinio ne meritas tian atenton. Sed ili havas unu kvaliton: ili estas „novaj”. Esperanto perdis sian „novecon”, kaj tial ĝeneralaj klarigoj pri la lingvo nun estas tre malfacile publikigeblaj en gazetoj kaj radio-programoj. Bedaŭrante tion, ni ofte forgesas, ke Esperanto povas esti „nova” temo, se oni utiligas ne la simplan fakton de ĝia ekzisto kaj la ĝeneralajn argumentojn por ĝia enkonduko, sed iun „novan” okazadon.

La 11-an de Majo, ekzemple, multaj el ni aŭdis mallongan programon pri Esperanto en unu el la plej gravaj nordamerikaj radio-programoj, disaŭdiĝita de centoj da radio-stacioj, el kiuj konsistas la NBC-reto (National Broadcasting Company). Milionoj aŭdis „frapan novadon” pri Esperanto. Kio do okazis? En Zürich, plej granda urbo de Svisujo, la Internacia Federacio Fervojista havis sian nunjaran kongreson. Tiuj fervojistaj kongresoj ĝenerale estas tre bone organizitaj. Ili ankaŭ havas grandnombran ĉeestantaron, ĉar fervojistoj povas vojaĝi senpage sur la fervojoj de preskaŭ ĉiuj landoj. La fakto, ke en tia kongreso fervojistoj, do personoj profesie laborantaj en la kampa de internaciaj komunikoj, interkompre-

nigas en lingvo neŭtrala kaj facile lernebla, estis sufiĉe interesa al raportisto de unu el la plej grandaj usonaj radio-organizaĵoj por vigla priskribo eĉ kun kelkaj frazoj en Esperanto.

Se Esperanto mem ne plu estas „nova” por gazetoj kaj radio-stacioj, novaj uzoj de Esperanto kaj diversaj kongresoj kaj progresoj de la Esperanto-movado do povas havi valoron de „novajoj”, se ni lerte — kaj ĝustatempe — altiras al ili la atenton de ĵurnalistoj, telegraf-agentoj kaj radio-stacioj. Ni diversfoje spertis, ekzemple, ke mallongaj raportoj pri kongresoj de EANA estas telegrafe disvastigitaj tra Usono, Kanado kaj aliaj landoj per la grandaj telegraf-agentoj AP (Associated Press) kaj UP (United Press). Antaŭ kelkaj jaroj la Ĝenerala Sekretario de EANA, S-ro G. Alan Connor, donis intervjuon al AP-korespondanto en Paris, kaj la raporto, sendita al Usono per transoceana kablo, eniris multajn ĵurnalojn. Eĉ el Hindujo venis gazeteltrancĵoj pri la Connor-intervjuo. Tio, kion S-ro Connor diris, estis interesa novaĵo, ĉar li diris ĝin en Paris, okaze de Universala Esperanto-Kongreso.

Estas unu el niaj plej urgaj taskoj, trovi novajn metodojn por atentigi gazetojn kaj radio-programojn pri iuj vere novaj kaj publikigindaj okazaĵoj en la praktika uzado de Esperanto. Tio ne estas facila laboro, ĉar multaj faktoj, kiuj ŝajnas al ni trege gravaj en la Esperanto-movado, ne estas konsiderataj sufiĉe interesaj en la ekstera mondo, dum aliaj faktoj, kiujn ni mem eble ne multe atentigas, interesas kaj impresas ĵurnala-kaj radio-raportistojn.

Mia dua ekzemplo koncernas la Esperanto-literaturon. Antaŭ 50-jaroj ekzistis nur malgranda nombro da literaturaj aŭ sciencaj verkoj en Esperanto. Estas vere, ke kelkaj centoj da lernolibroj, vortaroj kaj nacilingvaj propagandiloj estis aperintaj, sed preskaŭ ĉiuj estis maldikaj broŝuroj presitaj sur malbona papero kaj mizeraspektaj. Nun la Esperanto-literaturo estas ampleksa kaj grava, kaj ekzistas multaj verkoj bele presitaj kaj binditaj, kiuj impresas eksterulojn. La Biblio, la Antologio, fakaj verkoj pri sciencaj, politikaj, religiaj kaj artaj temoj, libroj pri geografo kaj vojaĝado, altkvalitaj, lernolibroj kaj vortaroj kaj tiel plu igas la Esperanto-literaturon grava faktoro en nia propagando.

Sed kio okazas, kiam oni eniras publikan bibliotekon en iu grava urbo en Usono, ekzemple en New York, Boston, Washington aŭ Cleveland, kaj trarigardas la liston de Esperanto-libroj en la katalogo? La unua impresio estas favora. Fakte multaj verkoj en kaj pri Esperanto estas tie.

Pli detala ekzameno bedaŭrinde ŝanĝas la unuan impreson. Rigardante la eldondatojn de la verkoj, oni trovas, ke

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO en 1956

Vi scias, Kara Leganto, ke *Universala Esperanto-Asocio* estas la unuola esperantista organizaĵo internacia kiu sin okupas pri la progresigo de Esperanto. Kial vi do longtempe hezitus fariĝi aŭ resti ĝia efektiva apoganto, fariĝi aŭ resti INDIVIDUA MEMBRO DE U.E.A.: membro kiu ricevas la Jarlibron, aŭ, pli bone, membro-abonanto, kiu ricevas krom la Jarlibron, ankaŭ la monatan revuon ESPERANTO?

Kaj bonvolu pripensi, Kara Leganto, ke per TUJA aliĝo aŭ realiĝo vi certigas regulan, seninterrompan alsendon de Jarlibro kaj revuo, kiuj informas vin pri ĉio sciinda rilate la tutmondan movadon. Pripensu ankaŭ ke per TUJA aliĝo vi evitigas superfluan ekstran laboron administran al la Centra Oficejo kaj al via peranto.

Ne preterlasu do havigi *jam nun* vian kotizon por 1956 al via ĉefdelegito aŭ al via peranto:

por Nederlando: Jacob Telling, Schietbaanlaan 106-a, ROTTERDAM, pĉk. 2426.19.

por Belgujo: F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, BLANKENBERGE, pĉk. 4161.35.

aŭ: Reĝa Belga Ligo Esperantista, pĉk. 1337.67 (Seraing).

LA KOTIZOJ estas, por 1956, en Nederlando: en Belgujo:

Membro kun Jarlibro:	gld. 3.75	b.fr. 50.-
Membro-Abonanto:	10.-	140.-
Membro-Subtenanto:	15.-	210.-
Patrono:	50.-	700.-
Dumviva Membro:	200.-	2800.-

libroj publikigitaj antaŭ la Unua Mondmilito(!) estas relative multe pli multnombraj ol libroj el la lastas tri jardekoj. Oni ankaŭ trovas, ke multaj el la plej gravaj, plej interesaj kaj plej belaspektaj libroj tute mankas. Sed oni trovas multe da nekonataj, iom strangaj aŭ eĉ tute fuŝaj verketoj. Objektiva observanto, kiu volas juĝi Esperanto-literaturon laŭ la verkoj troveblaj en la grandaj publikaj bibliotekoj, konkludus, ke la Esperanto-movado estis pli granda antaŭ 1914 ol nun. Li ankaŭ eble pensus, ke la kvalito de la Esperanto-literaturo kaj de la Esperanto-movado ĝenerale ne estas alta kaj ke oni apenaŭ rajtas konsideri la Esperantistaron, kiel kultur-movadon.

Kio kaŭzis tiun strangan situacion? Unu klarigo estas, ke la bibliotekoj aĉetis librojn pri Esperanto kaj en Esperanto, kiam la interlingvo ankoraŭ estis „nova”, sed poste ĉesigis la aĉetadon. Alia kaŭzo konsistas en la fakto, ke Esperanto-libroj en publikaj bibliotekoj ĝenerale ne estas aĉetitaj, sed donacitaj. Aŭtoroj, kies verkoj ne bone vendiĝis,

dissentis kvanton al bibliotekoj. Esperantistoj kaj Esperanto-klubo donacis al publikaj bibliotekoj tiujn librojn, kiujn ili „ne plu bezonis”, ĉar ili ne estis sufiĉe gravaj, interesaj, utilaj aŭ belaspektaj por esti retenataj en libroŝranko. Bedaŭrinde la libroj, kiuj devus esti en ĉiu grava publika biblioteko, ĝenerale estas la samaj libroj, kiujn ĉiu bona Esperantisto kaj ĉiu Esperanto-klubo ŝatas posedi. En aliaj vortoj, la problemo estas, havigi al la bibliotekoj valorajn librojn, kiuj kostas monon (bedaŭrinde!), ne senvalorajn librojn, kiujn la Esperantistoj volas fordoni aŭ eĉ forjeti.

Kelkfoje estas eble instigi publikon aĉeti gravan libron. Tio okazis sufiĉe ofte (eble mi devus diri: iomete ofte, sed ne sufiĉe ofte) pri *Esperanto: The World Interlanguage*. En multaj bibliotekoj (kompreneble ne en la plej grandaj) ĝi nun estas la sola moderna lernolibro de Esperanto. Mi konas unu bibliotekon, en kiu ĝi estas la unua Esperanto-lernolibro aĉetita post tiuj de O'Connor (eldonita en Anglujo en 1904) kaj Baker (eldonita en Usono en 1908).

Alia fakto, kiu rilatas al la Esperanto-literaturo, estas la situacio, ke en la jaro 1955 oni preskaŭ tute ne plu trovas Esperanto-lernolibrojn kaj aliajn Esperanto-librojn en librovendejoj. Antaŭ la unua mondmilito, sufiĉe multaj librovendejoj, en Usono kaj en aliaj landoj, enmetis Esperanto-librojn en siajn montrofenestrojn. La tekniko de la librovendado intertempe radikale ŝanĝiĝis. Librovendistoj ŝatas nur tiujn librojn, de kiuj ili povas facile kaj rapide disvendi grandajn kvantojn. Aliflanke la Esperantistoj trovis, ke estas preferinde ne aĉeti Esperanto-librojn en ordinara librovendejoj, sed mendi ilin de centra Esperantista libroservo, en nia lando de EANA. Tio ebligas pli bonan servadon, ĉar ja multaj libroj estas importataj el aliaj landoj, kaj samtempe havigas financan subtenon al Esperanto-organizo, kiu bezonas profitojn el libroservo por pagi deficitajn en aliaj faktoj de la Esperanto-laboro. Tamen la paradoksa situacio restas, ke en la nuna tempo, kiam la Esperanto-literaturo estas grava kaj ampleksa, la ĝenerala publiko havas malpli grandan ŝancon vidi Esperanto-librojn ol en la tempo, kiam malgranda librovendejoj montris Esperanto-librojn en siaj fenestroj kaj sur la vendotabloj.

Unu el la eblaj solvoj de tiu problemo estas, ke oni klopodu eldoni librojn kaj libretojn pri Esperanto en serioj de popularaj libroj kaj ke oni enmetu Esperanto-partojn en librojn kun pli ĝenerala enhavo. En Usono iam multe vendiĝis mallonga Esperanto-lernolibro eldonita en la serio de *The Little Blue Books* („La Bluj Libretoj”). Multaj el ili penetris en rondojn, kiujn la ĝenerala Esperanto-propagando ne atingis. Post la Dua Mondmilito, Ges-roj G. Alan Conner verkis ĉapitrojn pri Esperanto en la grava kaj serioza verko de Profeso Mario A. Pei, *The World's Chief*

NIAJ ESPERANTO-ENIGMOJ KUN PREMIOJ.

PREMION akiris post la n-roj 195/196: s-ino A. Meurrens, el Leuven, por V.E.B.; kaj por L.E.E.N.:

SOLVOJ

197. supreniri; klorofilo; karnavalo; improvizi; standardo; parafrazo; krokodilo; diapazono; kameleono; gramofono; handikapo; pitoreska; klasifiki; suĉinfano; klimatizi; grumbulo; telemetro; provizora; kokcino; kreditoro; datreveno; prospekto; maskerado; trubaduro; referenco; aligatoro; maĉtabako; skafandro; ekspluati.

Por paro amanto ĉiu loketo sufiĉas. 198. Hor.: krucoplakaj; kluki; cejan; gri; erodi; gapul; nuntemp; varb; ebena; solida; etul.

Vert.: koktel; kajol; unuton; duoblig; origin; trepan; lacige; amleter; kaj; pp; bazuk; jongli.

199. ELLASU LITERON

La unua klarigo el ĉiu duo difinas sesliteran vorton. Ellasu unu literon kaj intermiksu la aliajn por trovi novan vorton respondantan al la dua klarigo. La ellasitaj literoj samorde legataj formas proverbon.

1. ĉifona vagulo; publika trafikilo. 2. vira pantaloneto; batalo sen armiloj. 3. pompa ceremonio; rabobesto. 4. malgaja; kunkolekti fojnon. 5. meslibro; planto simila al urtiko. 6. riĉa rusa kamparano; ĝi estas uzata kiel mortero. 7. branĉo kun folioj; pikilo de planto. 8. krei kaj cirkuligi monon; stulte imiti. 9. profunda kruta valetto; parenca persono. 10. monunu kun alta kurzo; porkograso. 11. malgranda ŝarko; aro da same progresintaj lernantoj. 12. inseksesta estaĵo; brulanta gaso. 13. parto

Languages („La Ĉefaj Lingvoj de la Mondo”) kaj en la populara kaj malmultekosta verketo de Marcel Rodd, *The 10-in-1 Dictionary of Basic Language* („Baza vortaro de 10 lingvoj en unu libro”). Oni devus zorge studi la eblecon, enmeti similajn Esperanto-partojn en librojn vendeblajn en rondo ĝenerala ne atingata de nia laboro. bonaj sukcesoj tiurilate estas realigitaj lastatempe en diversaj landoj, ekzemple Francujo.

Eble kelkaj legantoj diros: Estas facile, paroli kaj proponi; estas malfacile, realigi tiajn ideojn. Ili estos pravaj. Sed se ni volas atingi nian celon, ni devas lerni el la bonaj kaj malbonaj spertoj de la pasintaj 50 jaroj kaj daŭrigi nian agadon ne en blinda entuziasmo, sed kun sistema plano kaj klare ellaborita programo.

El „American Esperanto Magazine”.

de la vizaĝo; subtera fungo kun delikata aromo. 14. parto de kanono en kiu la pulvo eksplodas; profunda falto. 15. ŝtupetaro; servisto ĉe riĉuloj. 16. fiŝeto el kiu oni faras sardinojn; parto de homa korpo. 17. okulparto; papilieto en la domoj. 18. granda senvenena azia serpento; pika ekstremo. 19. kredi ke io dezirata okazos; neatendite detruigi. 20. kapoparto; manlabora profesio. 21. hazardludo en kazinoj; ilo de masonisto. 22. linio; ligna ujo. 23. enlanda ĉasbesto; altvalora globeto.

200. KRUCVORTENIGMO

	1	2	3	4	5	6	7	8	9	10	11
1	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
2	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
3	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
4	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
5	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
6	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
7	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
8	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
9	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
10	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□
11	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□	□

Horizontale. 1. plej alta grado(R); bruego(R). 2. prepozicio. 3. tuto de la moralaj ecoj en homo; parto de arbo(R). 4. rapide kaj ripete svingi(R). 5. kaŝo observi(R); maldelikata(R). 6. ricevinta akran malagrablan odoron, kiel ĉe grasoj. 7. kurba tenilo de korbo; malperfektaĵo(R). 8. trupo da muzikistoj kune ludantaj(R). 9. ludkarta koloro; longkrura birdo(R). 10. malgranda. 11. senkompense doni(R); fiksi la linion kie finiĝas spaco(R).

Vertikale. 1. parto de cirklo(R). 2. birdo kun tre malgrandaj flugiloj(R). 3. sennuba kaj senventa(R). 4. seĝo de suvereno. 5. spirita atmosfero de iu medio(R); kvalito(R). 6. diskute malfacile akcepti(R). 7. netuŝebla(R); ekstrema flanko de konstruaĵo(R). 8. laŭformula pagordono de difinita sumo(R). 9. Libro por konservi fotografiojn(R). 10. literatura tipo de eleganta virindeligisto(R). 11. esprimo de amo(R).

**

Solvojn sendu la nederlandanoj al s-ro G. J. Teunissen, Burg, Tellegenstraat 21 hs., Amsterdam-Z.; la membroj de F.L.E. en R.B.L.E. al s-ro F. Couwenberg, Koninginnelaan 14, Blankenberge, ĝis fino de la monato.

MEDEDELINGEN VOOR DE BOEKENDIENSTEN

DECEMRRO - LIBROMONATO

		gld.	fr.
La internacia lingvo (D-ro Lapenna)			
	Faktoj pri Esperanto	bind. 5,75	76,—
Peer Gynt (Ibsen)		8,—	
id	broŝ.		90,—
La Normandaj Rakontoj (Maupassant)	bind.	12,—	160,—
La Nevenkebla ĝeno (Thyssen)	„	4,90	70,—
Fabiola (Wiseman)	„	8,—	80,—
id.	broŝ.	4,50	
Ferio kun la morto (Lindqvist)	„	2,25	30,—
La Knaboj de la Paŭlo strato (Molnar)	„	1,20	16,—
Colomba (Merimee)	„	1,20	16,—
Herman kaj Doroteo (Goethe)	„	0,75	10,—
El la „Camera Obscura” (Hildebrand)	„	0,75	10,—
Ce la Sanktaj Akvoj (Heer) Svisa romano	bind.	6,75	75,—
La Alia Pasinteco (Bulhuis)	„	4,90	70,—
La Vivo de Nia Sinjoro Jesuo (Dickens)	„	3,70	60,—
Vivo de Zamenhof (Privat)	„	3,25	40,—
Undino (Schreiner)	„	4,25	40,—
Romano pri Afrika bieno (Schreiner)	broŝ.	1,50	26,—
Victoria (Hamsun)	„	1,40	22,—
La Hundo Kruso (Ballantyne)	„	1,75	
La Homaj Rasoj (Nordenstreng) ilustrita	„	3,40	40,—
Por viaj korespondantoj:			
Haarlem (kun multaj fotoj)	broŝ.	1,—	
Rakontoj pri Nederlando (Duhamel)	„	1,75	25,—
Salutkartoj por Kristnasko kaj Novjaro			
serio de 6 diversaj kartoj		0,60	8,—

MENDU ĈE

Libro Servo LEEN, Pythagorasstraat 122, Amsterdam
 Belga Esperanto-Instituto, Oostenstraat 26, Antwerpen
 Flandra Esperanto Instituto, Blankenbergse Steenweg 72, BRUGGE

(Sekvo de paĝo 4)

komend— kaj eĉ mok—. 6: Tamen la pac— batalant— persistis kaj daŭrigis la voj— elektit—. 7: Ni, nuntemp— Esperantist—, havas malpli malfacil— situaci— kaj task—. 8: Ni havas la lingv— projekt— pret— antaŭ ni kaj long— praktikad— malantaŭ ni. 9: Mult— registar— kaj oficial— instanc— kiel UNESKO konsideras la ling— internaci— aplikind—. 10: Despli dank— ni estu al d-r— Z., kiu donacis al la homar— la relativ— facil—, praktik— kaj belson— lingv— Esperant—.

Ekzerco 27 B :

Metu en ĉi-subaj frazoj tien, kie estas streketo, po unu el la sekvantaj 10 vortoj kaj donu al ili la ĝustajn gramatikajn finaĵojn:

1: arbitraco; 2: aresti; 3: haltigi; 4: argano; 5: arogi; 6: artifiko; 7: aserkuri; 8: aserti; 9: asigni. 10: aspekti. 1: Sur la kajo de la havenurbo atendis multaj — por levi la pezajn varojn el la ŝipoj. 2: Oni — la ŝipon ĝuste antaŭ la kajo. 3: Oni devus fini ĉiun internacian konflikton per — anstataŭ per milito. 4: La registaroj —

grandajn sumojn por la militpreparo anstataŭ por la batalo kontraŭ la kancero. 5: Post multaj klopodoj la policisto sukcesis — la ŝtelinton. 6: La ŝtelinto — tre pala. 7: Li klopodis per ĉiaj — liberigi sin. 8: Li persiste —, ke li estas senkulpa. 9: La ŝtelitaj objektoj ne estis —. 10: La sekretario — al si la rajton ŝanĝi la decidon de la estraro.

Ekzercojn korektotajn gelegantoj sendu al la kompilinto de la rubriko: S. S. de JONG Dzn., Waltaweg 3, TIERKWERD bij BOLSWARD (Frislando), NEDERLANDO.

Lasta Novajeto el Flandrujo

Afdeling Leuven: onder de leiding van ons bestuurslid Mevr. Meurrens, gaat te Leuven een nieuwe cursus door, de eerste werkelijk geslaagde sinds lange tijd. Een zestal leerlingen volgen ijverig de leergangen, en wij hopen dat uit hen de hernieuwde bloei van afd. Leuven mogen geboren worden!

NEKROLOGO

La 18-an de septembro en la aĝo de 66 jaroj mortis nia kara samideano Riek Plempers van Balen, Zeist. La cindrigo okazis la 22-an en la krematorio en Westerveld apud Velsen.

La mortintino estis konata Esperantistino, kiu speciale antaŭ la milito vigle partoprenis la movadon. Estante kapabla instruistino, ŝi ankaŭ kun multe da verovo kaj rezultplene instruis nian lingvon. Konataj kaj multvizitataj estis ŝiaj Esperanto-kursoj laŭ la Cseh-metodo en la jaroj antaŭ la milito.

Ĉiam helpema, ĉiam inklina forpreni la malfacilaĵojn de aliaj, ŝi multe amis la internan ideon de Esperanto. Dum la multaj kongresoj, kiujn ŝi vizitis (Oxford, Stockholm, London, Zagreb, Haarlem) ŝi faris multajn geamikojn. El tio rezultis ŝia diversflanka korespondado pere de longaj leteroj en senerara, flua lingvo.

Post la milito ŝia sanstato pli kaj pli malfortigis. Vizito al Parizo dum la plej varmaj tagoj de ĉi tiu somero estis tro laciga kaj fariĝis katastrofa. La malforta korpo tute elĉerpiĝis. Kiam poste la stomako rifuzis la laboron, la fino venis baldaŭ - Tro baldaŭ.

* * *

Neatindita mortis la 20-an de oktobro, nia amiko Willem Taconis en la aĝo de 77 jaroj. Dum jaroj li estis sekretario de nia klubo. Multan atenton li donis al Esperanto. Multfoje ni kunvenis ĉe li hejme; ĉiam li estis gastama gastiganto. Ĉiam li estis preta helpi nin por la afero de Esperanto. Laborante en sia ĝardeno, li subite estis ne bona. Bedaŭrinde la kuracisto ne plu povis helpi lin.

Ni memoras lin kiel bonan kaj fidelan amikon. Li ripozu en paco.

* * *

La 21an de novembro mortis en aĝo de 63 jaroj F-ino Cornelia Franken, kiu dum multaj jaroj estis fidela kaj tre ŝatata animo de nia sekcio Hago. Dum la militaj jaroj la membroj de la sekcio ofte kunvenis en ŝia domo kaj multajn jarojn ŝi estis akurata kasistino. Post la milito ŝi longtempe multe suferis pri reŭmatismo kaj fakte ŝi ne plu povis iri, sed feliĉe iom post iom tio pliboniĝis kaj ŝi resaniĝis tiel ke ŝi denove de tempo al tempo povis viziti la klubvesperojn. Nun ĉio finiĝis. Ŝi ripozu en paco.